



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORIÁ**

**DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS**

**Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16**

**KIAM LA VIVO ANKORAŬ ESTIS TIA**

*Al senlaca pionirino María Casanovas sincere.*

**PACO**

La nokton regas pac'... L'arbar' susuras.  
Nenie rompas fremda bru' misteron.  
Nur vekas plor' de najtingal' la teron.  
Kaj... For ripozo jam!... river' murmuras.

Malfermas mondfenestron l'ektagiĝo,  
Por montri de la tero ravan belon  
Kaj birdoj traflugadas la ĉielon,  
Ĝojante pro la tera reviviĝo.

Sin kaŝis en la nest' la najtingalo.  
Ridetas nun la tag' sub arda sun',  
Dum la kampar' fruktigas en la valo.

Iranta la kampul' kun kor' sen laco  
Kliniĝas kun fervor'... Ho milda pun'!  
Kaj preĝas en silent'... Solena paco!

**LABORO**

Post preĝo la kampul' ravite vidas  
La kampon, kiun li ameme semis.  
Printempe kun espero li ĝojtremis  
Kaj al rikolt' abunda nun li fidis.

L'orfrukto falas, dum falĉilo brilas,  
Ĉar la kampula brak' ĝin febre movas.  
Li grenon sur draŝbed' amase trovas  
Kaj timon el la kor' kun ĝoj' ekzilas.

Jam milda vent' ludetas sur la greno.  
Por vintro tiu estas riĉpromes'.

Vespero!... Li pretiĝas por reveno.

Survoje al la hejm' la vir' sopiras  
Al amatin' la kara, pri l' kares'  
Dum ĉarma ĉirkaŭprem'... kaj li flugiras.

**AMO**

Barako staras blanka, senmakula  
En mez' de l' paradiz' ĝin ornamanta  
Kaj la jasmena laŭb' nun plenfloranta  
Pretiĝas neston por gear' kampula.

Laŭ eta voj' mallarĝa ili venas.  
Li prenas kun frenez' ŝin ĉe l' talio.  
Baraktas la virin' sen bru' sen krio.  
Kaj fine ŝi en nokto ame svenas.

Sur bed' florplena plore ŝi sopiras.  
Rigardas kun feliĉo ŝin l'amat'  
Kaj vortojn ampromesajn al ŝi diras.

Kaj la virin', celante ambalsamon,  
Ĉar ĉe la vir' ne ĉesis la korbat',  
Per kisoj dolĉestingas lian flamon.

FRANCISCO LLORÉNS MARTÍNEZ.

**INFINITIVO ANSTATAŬ PARTICIPO**

*Daŭrigo*

Ĉiufoje kiam la uzado de infinitivo anstataŭ participo estas tute klara, oni ne devas kondamni ĝin ĉar la lingvo ĉiam preferas la pli mallongajn esprimojn (kompreneble se la klareco estas perfekta) kaj emas ellasi ĉion, kio estas superflua aŭ nenecesa. Tial, oni diras ekz. *konsterna sciigo* anstataŭ *konsternanta*, *fiksa prezo* anstataŭ *fiksita* k. t. p. Kompreneble *ĉarma virino* ne signifas same kiel *ĉarmanta virino*. La unua esprimo signifas *ĉiam-ĉarmanta virino*, tio estas ĉarmecon, kiel esenca aŭ daŭra kvalito, dum *ĉarmanta* esprimas nur la nuntempan sendaŭran ĉarmecon (eble ŝuldita al ia aparta favora ĉirkonstanco, kiu povas malaperi).

La du sencoj malsamaj, kiujn S-ro Roca trovas por la du esprimoj: "*ni lasu lin kuŝanta* kaj" *ni lasu lin kuŝi* (ni permesu, ke...), dependas nur de tio, ke la verbo *lasi* havas du malsamajn signifojn: 1) restigi, 2) permesi, toleri, kaj oni aplikas malsaman sencan el ĝi al ambaŭ esprimoj. Sed se anstataŭ *lasi* oni uzas *vidi* kaj oni diras: "*mi vidis lin kuŝi* aŭ *kuŝanta*", la senco estas pli-malpli sama. La rezonado de la ekzemploj kun *lasi*, ne estas do ĝenerala, nek aplikebla al la uzado de participo anstataŭ infinitivo.

En plej bonaj aŭtoroj kaj eĉ en D-ro Zamenhof mem oni trovas frazojn kiel: *mi lasis lin pa-*



roli, lasu min rakonti, ĉi tiu ne lasis sin fortimigi k. c. kaj ĉar tiaj esprimoj havas plej klaran sencan kaj estas uzataj en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, ne estas juste ilin kondamni. Se S-ro Roca pli amas la participajn formojn li havas perfektan liberecon por ilin uzadi, sed ne forprenante de ni la liberecon uzadi la infinitivajn formojn, se ili estas tute klaraj.

Ankaŭ erara mi trovas la aserton, ke en hispana lingvo oni ne povas diferencigi la adjektivojn kaj la participojn atributajn de la predikataj. Por pruviti tion ni pritraktu la samajn ekzemplojn prezentitajn de S-ro Roca. Se ni diras en hispana lingvo "Dejad el plato limpio" oni povas konfuzi la sencan de "lasu la puran teleron" kun tiu de "lasu la teleron pura". Sed se ni diras: "dejad limpio el plato" estas evidente, ke ĝi nur povas signifi: "lasu la teleron pura". Eĉ en poezia esprimo oni povus diri: "dejad el limpio plato y a otra cosa" kaj estas plej sendube, ke la senco estas ĉi tie: lasu la puran teleron... Ankaŭ mi kredas, ke la kataluna lingvo havas la frazon: *deixa net el plat* por signifi: lasu la teleron pura.

Por la frazoj: "Petro vidis la birdojn pentritajn (aŭ pentritaj)" la hispana lingvo (kaj kredeble la kataluna havas por nuanci la signifon tri tradukojn, same kiel Esperanto, nome: "Pedro vió pintados los pájaros (pentritaj)", Pedro vió los pájaros pintados o los pintados pájaros (pentritajn) kaj "Pedro vió pintar los pájaros (pentri)". Mi do ne komprenas kial s-ro Roca asertas, ke la hispana lingvo ne estas tiel riĉa, kiel Esperanto por traduki tiajn frazojn.

En la ekzemploj "Oni vidas la kuniklojn manĝantaj (aŭ manĝataj)", S-ro Roca proponas kiel nuran eblan tradukon hispanan "Se ha visto comer los conejos", ĝuste la solan esprimon, kiu ne estas hispana, ĉar la citita frazo estas galicismo, kies senco por ni hispanoj estas nekomprenebla. Tamen la hispana lingvo havas riĉan nuancecon de frazoj por traduki la cititajn ekzemplojn: "han visto comer a los conejos, comiendo a los conejos, comer los conejos, comerse los conejos", k. c. Mi ne haltas difini la delikatajn nuancojn de tiuj frazoj por ne plilongigi tiun ĉi artikolon.

La paradigmoj: *mi ci... kuŝilasas aŭ kuŝlasas k. c.*, ne estas rekomendindaj, ĉar ili estas strangaj kaj pli-malpli same longaj, ol la ĉiam uzataj kaj naturaj formoj; *mi lasas kuŝi*, k. c.

La novan radikon "hiperbatono" mi ne trovas necesa, ĉar ekzistas jam la Zamenhofa vorto "inversio", kiu same signifas. Krom tio se oni volus eltiri novan radikon, ĝi estus pli bone hiperbato, tiel same kiel oni diras ekz.: *administracio* kaj ne *administraciono* malgraŭ, ke en la naturaj lingvoj la formoj administraci6n, administration, k. c. finiĝas per *-on*.

Fine la esprimo de S-ro Roca: "Brili la suno estas bela spektaklo" estas malkorekta kaj nur imito de hispana idiotismo. Mi neniam legis ĉe bonaj aŭtoroj unu solan ekzemplon de infinitivo kun subjekto. Se S-ro Roca prezentus al mi ekzemplojn el bonaj Esperantistoj mi plej kore lin dankus, sed ĉiuj esperantistoj diras: "la brilo aŭ brilado de la suno estas..."; eĉ oni povas mallongigi dirante: "la sunbrilado estas..."

Komprenable tiu ĉi artikolo nur havas la celon klarigi la interesan demandon pritraktitan de S-ro

Roca. Mi esperas, ke li bonvole kaj indulge akceptos miajn sincerajn rimarkojn, kiujn mi kuraĝis publike esprimi, ĉar per la demandoj de miaj lernantoj mi konstatis, ke la artikolo de S-ro Roca lasis kelkajn mallumajn punktojn, en kiujn ankaŭ enŝoviĝis senvolaj eraroj.

VICENTE INGLADA.

## ARTAJ PAĜOJ

Daŭrigo

Pro tio Morales daŭrigis sian artan karieron sen hezito, pentrante sencese scenojn el la morto de Kristo, Madonojn kaj Sanktulojn, ripetante ĉiam la samajn aferojn.

La arta spirito de la pentristo ne ŝajnas preta nek emas renoviĝi kaj uzi sian naturan talenton, pentrante portretojn, mitologiaĵojn aŭ scenojn de la ĉiutaga vivo, per kiuj dank' al sia facila inspiro li povus gajni riĉaĵojn kaj famon. Kontraŭe li daŭrigas same ĝis sia morto. Li scias, ke liaj gustoj ne plaĉas ĉiujn, sed li obeas sian animon kaj la religian senton tre forte enradikiĝintan, kiun li portas en sia koro. Ŝajnas kvazaŭ li pentrus ne por enspezi monon, sed por montri per tiaj pentraĵoj siajn religiajn kredojn, siajn konceptojn kaj pensojn pri la diaĵoj. Lia kolorado harmonia, delikata kaj brila estas tute simila al tiu de Quentin Metsys. Kun granda fervoro li kopiis la desegnomanieron de la majstroj de Firenzo.

Kie Morales postlasis plej perfekte sian profundan, personan arton, tie estis en la verko "Dolora Madono". Tie ĉi la Virgulino aperas kun kuniĝintaj manoj kaj interplektitaj fingroj. Ŝia kapo, preskaŭ nerimarkeble klinita al la maldekstra ŝultro, estas eble la parto plej mirinda de la verko. Ŝiaj okuloj ruĝiĝintaj pro plorado havas malgajan rigardon. Ŝajnas kvazaŭ tra la larmoj ŝi vidus ankoraŭ la tragikan scenon. Ho homa krueleco vundinta ĝisfunde Ŝian koron!

La belformaj, kvankam palaj lipoj de Madono ŝajnas esti en momento de spasma pro sopira elspiro. Ŝiaj majstre pentritaj vestaĵoj montras sur melankolia fundo la figuron de Madono, kiel se ĝi estus mirakla aĵo.

Ludoviko Morales, kiun la posteularo kromnomas "la Dia" naskiĝis en 1509 en Badajoz, kie li mortis la jaron 1586-an.

Li estis aŭtoro de belegaj pentraĵoj, kiuj troviĝas en multaj muzeoj apud la plej mirindaj kreiĵoj de la universala, religia arto.

JOSÉ GASCÓN.

La 17-a de Februaro estis la unua jarcenta datreveno de la naskiĝo de la glora, hispana poeto Gustavo Adolfo Bécquer, la romantika kaj genia, kantisto de l'amo. En la marta numero ni publikigos artikolon de Sro. Gascón memore al li.

## NOVA GAZETO

Antaŭ nelonge ni ricevis la unuan numeron de la nova, trimonata gazeto "Nia Idealo" redaktata parte hispanlingve kaj parte esperante.

La esperanta parto estas lerte reviziata de nia kara kunsocietano Sro. Johano Régulo Pérez en Kanariaj Insuloj. Nian bondeziron.



## Letero el Nederlando

Ĉi tiu letero mia temas pri la nova jaro. De jaro al jaro, la transiro de la malnova al la nova jaro estas akompanata per ĝojo kaj gajeco, esprimata per pafado, muziko, kantado de novjarkantistoj k. t. p.

Jam en la pratempo niaj prapatroj faris la samon. La plej grava vivproblemo de niaj nordaj popoloj vivantaj en tiu tempo, estis konservi kiel eble plej longe la sunlumon kaj la sunvarmon. La sunvarmo, kiu ĉiam pli malfortiĝas ĝis la fatala dato, la 21-a de Decembro, la dato de la mezvintra suntuŝnigo.

Tiam, la batalego inter la malvarmo kaj la varmo, la lumo kaj la mallumo, la vintro kaj la somero, atingis sian plej altan gradon.

Ĉu estas mirige, ke la homoj, vivantaj en tuta dependo de la sumo,—la nura vivo-fonto en la ĉiama necerteco,—klopodis helpi la adoratan sunon ĉe ĝia batalego kontraŭ la potencoj de la mallumego?

Unu el la plej bonefikaj rimedoj, por kontraŭtari kaj forpeli la fantomon de la mallumeco—kiu en la Germana mitologio havis la figuron de "Loki" la dio de la mallumeco, kontraŭ la figuro de la eterne lumdonanta "Baldur"—estis, fari kiom eble plej multon da bruego.

Ĉu la krimulo, kiu intencas fari en la mallumo sian krimon, ne tuj forkuras, aŭdante bruon, kaj ĉu la ŝtelisto ne forrestas el la domo, rimarkante tie ian bruadon?

Pripensante tion, ni certe pli bone komprenas la pensojn kaj agojn de la homoj vivantaj en tiu epoko.

En diversaj vilaĝoj de la Provinco Frislando oni uzas apartan manieron rememorigi tiun tempon.

En tiuj vilaĝoj oni trovas sur la tombejo sonorilojn, pendantaj en lignaj ejoj. Dum 10 tagoj, de la 21-a de Decembro ĝis la 1-a de Januaro, maljunuloj kaj junuloj kolektiĝas sur la tombejon por tiri la ŝnuron de la sonorilo. De la frua mateno ĝis la malfrua vespero oni sonorigas kaj sonorigas por forpeli la malbonajn fantomojn el la aero, por ke baldaŭ la suno povu penetri la densajn nubojn.

Kompreneble estas, ke la ĉirkaŭloĝantoj ne ĉiam estas kontentaj pri tia brua sonorigado, kaj iam en ia vilaĝo okazis, ke kelkaj personoj plendis pri tio ĉe la vilaĝestro. Ĉi tiu decidis forigi la sonorilon. Li transportigis ĝin al alia vilaĝo, sed nokte, kelkaj enloĝantoj devigis la kamparanon, kiu per ĉevalo kaj ĉaro forportis la sonorilon, reporti ĝin kaj la sekvintan tagon ree pendis la sonorilo je la sama loko, kaj ree oni aŭdis en la vilaĝo ĝian sonon. La rezulto estis, ke ĝi restis je sia malnova loko. En la Provinco Groningeno ekzistas ankoraŭ la novjarkantisto. Ankaŭ tio estas multjarcenta kutimo.

La kantisto vizitas la disajn farmbienojn por kanti siajn novjarkantojn kaj ĉie li estas akceptata kiel anĝelo, kiu alportas la feliĉon en la ĵus aperintan jaron.

En la Provinco Gelderlando, oni uzas strangan kaj tre longan trumpeton. Starante malantaŭ la domo, oni eligas akrajn sonojn aŭdeblajn de granda malproksimeco, kredante kaj esperante, ke tiuj

sonoj forpelas la malbonajn fantomojn de la kampoj, por ke oni ricevu en la nova jaro riĉan rikolton. Karaj geamikoj, nur tre koncize mi priskribis kelkajn kutimojn de la kamparanoj el diversaj partoj de mia lando, okazintajn ĉe la adiaŭo de la malnova jaro. Ili estas kutimoj jam ekzistantaj jarcentojn kaj mi ĝojegas, ke niaj kamparanoj ankoraŭ daŭrigas la kutimojn de siaj prapatroj, ĉar per tiuj kutimoj ni almenaŭ scias ion pri la pensoj kaj agadoj de niaj prapatroj. Mi danke pripensas tion.

Geamikoj, akceptu miajn bondezirojn en la nova jaro. Mi esperas, ke ĝi estos jaro prospera por Via grupo "Frateco" kaj samtempe por nia belega Esperanta movado. Kamaradece.

W. SLOTEGRAAF.

Hago, la 29-an de Decembro 1935.

(\*) Pro nevolaj kaŭzoj oni ne publikigis ĉi tiun artikolon en la januara numero.

## LA KANKROJ

### Legendo de la Rejnlando

En Kolonjo, kiu en la mezepoko dum longa tempo estis la plej prosperanta kaj plej loĝantava urbo de la germana regno, antaŭ multaj jarcentoj vivis riĉa burĝo, nomata Dippold. La mono en liaj kaso plimultiĝis laŭ enigma maniero, kaj la popolo rakontis unu al la alia kun timema flustrado, ke li interrilatas kun la diablo. Ĉi tio ja ne estis vera, tamen ne tute senmotiva, ĉar li mem estis diablo je malbonkoreco kaj monavido, senkompata uzurulo, kiu en la paglimitago forpelis siajn ŝuldatajn el domo kaj korto, se eĉ nur unu helero mankis je la repagota mono. Ĉie li estis malamata kaj timata, ĉiu sciis, ke ankaŭ liaj komercaj entreprenoj estis malhonestaj kaj trompemaj; sed neniu kuraĝis, akuzi lin, ĉar per grandaj mondonacoj li estis akirinta al si la amikecon de kelkaj senatanoj kaj juĝistoj. Se oni ja estus scietinta, ke li eĉ estis perfidanto de la urbo, sekreta kunulo de rabistoj kaj mem murdistoj, lia tuta riĉeco ne estus ŝirminta lin kontraŭ justa puno, sed ĉi tion neniu sciis. Dippold estis bona amiko de rabista bando kaj kelkaj kavaliraj banditoj, kiuj tiam en Rejnlando rabadis, li sekrete informis siajn kunulojn, pri la karavanoj de la komercistoj el Kolonjo kaj dividis la rabajon kun ili, li igis surprizataki kaj murdi la senditojn, kiuj alportis liberigmonon por la kaptitoj kaj tiamaniere per perfido kaj sanga kulpo ĉiam amasigis novajn trezorojn al la malnovaj.

Foje li troviĝis sekrete ĉe malbonfama rabisto kaj bandano, la juna nobelo "Herchenstein". Tiam oni kondukis antaŭ lin monaĥon, kiun kaptis la servistoj de Herchenstein, laŭ la ordono de Dippold, ĉar li estis transportanta gravan sciigon. Sed la monaĥo persiste rifuzis malkaŝi sian sciigon al la kolonjano; kaj kiam Dippold kolere minacis lin per la morto, li avertis lin pri lia propra morto kaj kriis: "Memento mori! (pensu pri la morto!) Pensu pri via lasta horeto kaj pentofaru, por ke vi ne foriru kun viaj pekoj!" Jen la ekkoleranto



puŝis sian tranĉilon en lian bruston kaj malbenante forrajdis, ne zorgante plu pri sia viktimo.

Malmultajn semajnojn post ĉi tiu sekreta malbonfaro Dippold invitis la plej altrangajn personojn de la urbo kaj ĉiujn, kies favoro ŝajnis al li grava, al pompa festeno, kiu estis okazonta en la vasta halo de lia domo, tie sidis la riĉa mastro en grandvalora vesto sur la honora loko kaj havis staranta apud si pezan keston kun ormoneroj, kiujn li volis disdoni al la muzikistoj kaj al la polamasoj, kiu interpretiĝis antaŭ la pordegoj. Sed kiam li ĝuste levis la pokalon, por saluti siajn gastojn, neinvitito eniris en la ĉambregon, monaĥo en longa griza vesto. En lia mortpala, preskaŭ senkarna vizaĝo, minacante kaj enigme, ardis malhelaj okuloj el profundaj orbitoj, kvazaŭ ombro la timiga figuro glitis laŭlonge de la gastoj, kiuj terurite klinis sin malantaŭen, kaj restis starante antaŭ la gastiganto. Ĉi tiu ektimigite esplorrigardis en la kadavrosimilan vizaĝon de la fantoma fremdulo, li kredis vidi konatajn trajtojn—poste li tenis renkonte al li la pezan pokalon kaj kriis: “Kuntrinku kun mi por la feliĉo de mia domo!”—“Mi ne trinkos kun vi”, malrapide diris la monaĥo, “ĉar vi trinkas sangon!”—Jen la pokalo el la mano de Dippold tintante falis sur la tablon kaj malhelruĝa fluaĵo similanta al homsango versigis sur la blankan tablotukon. Duonsvenante la komercisto refalis, sed la monaĥo pluparolis kaj lia voĉo ne sonis kiel homvoĉo: “Memento mori! Pentofaru, por ke vi ne foriru kun viaj pekoj! Post mallonga tempo via fera havaĵo estos ŝanĝita en polvon kaj cindron!”

Jen Dippold eksaltis kaj furioza pro teruro kaj kolerego li kriis: “Reiru en la inferon, vi malbenito! Prefere la kuiritaj kankroj rampu ĉi tie trans la tablon, anstataŭ ke miaj riĉaĵoj estu neniigitaj”. Li apenaŭ estis finparolinta, kiam la kuiritaj kankroj ekmoviĝis en la larĝa ora pelvo, rampis malrapide kun mallertaj movoj trans la randon, kaj celis al Dippold! Samtempe muĝanta ventopuŝo malfermis la fenestrajn kurtenojn, kaj el la malheliginta ĉielo malsupreniĝis flamanta fulmo, kiun sekvis surdiga tondro. Ekterurite la gastoj forkuris el la ĉambrego, ne plu okupante sin pri la gastiganto, kiu trafite de apopleksio apogis sin en sia seĝego. Sed kiam ili kaj la antaŭforkurintaj servistoj sur la strato rigardis malantaŭen krakantaj flamoj eliĝis el la fenestroj, kaj post mallonga tempo la fera konstruaĵo kun ĉiuj trezoroj kaj riĉaĵoj estis detruita de la fajro.

Tradukis,  
E. SCHUFF.

Berlin-Friedenau.

## « NIA GAZETO »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografajoj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiunmonata gazeto estas “Aragona Esperanto-Fe-

deracio” — strato Roda 10, Zaragoza—, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokosito enkalkulita.

## NIA KONGRESA LOTERIO

Oni rememorigas niajn societanojn, ke, celante ebligi la partoprenon de iu el ni en la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Vieno la nunan jaron, Frateco aranĝis loterion laŭ la reguloj kaj kondiĉoj klarigitaj en la folioj aldonitaj al la numeroj de NIA VIVO de oktobro kaj decembro de la ĵus pasinta jaro. La kosto de ĉiu loteria numero estas unu peseto.

Profitu do, Fratecinoj, ĉi tiun unikajn okazon partopreni Universalan Kongreson de Esperanto spite de monaj cirkonstancoj, eble malfavoraj, kaj aĉetu biletojn de nia loterio.

## Jarraporto de la Grupo Esperantista Valencia

La Grupo Esperantista Valencia dum la ĵuspasinta jaro tre vigle laboradis por nia idealo en diversaj kampoj, precipe ĉe Radio, Komerco, Instruado kaj Propagando, tial oni pensis ke dispublikigo de tiu sukcesa agado inter la neesperantistoj estus bona propagando por nia celo. Do, oni presigis milon da bonaspektaj broŝuretoj enhavantaj ne nur la jarraporton (1935) de la Grupo Valencia verkita de ĝia agema Sekretario Sro. Bosch (G.) sed ankaŭ la verkon, kiun la Vic-Prezidanto Sro. Piñó prezentis al la Ekonomia Konferenco de la Valencia lando. Ĝia titolo estas “La tutmonda esperantista organizo je helpo al la Valencia Ekonomia”. Ambaŭ artikoloj estas hispanlingvaj kaj la broŝurojn oni dissendas al Gazetoj, Societoj instruaj, komercaj, literaturaj kaj ekonomiaj, al gravuloj, politikuloj, instruistoj k. t. p.

Ĉiu, kiu deziras ricevi senpagan ekzempleron, petu ĝin al “Grupo Esperantista Valencia” Sangre 9. VALENCIA. Hispanujo.

## LA ĜENERALKUNSIDO DE «FRATECO»

La 26-an de januaro okazis en nia ejo la ĉiujara ĝeneralkunsido de nia Societo.

Rezulte de ĝi oni elektis anstataŭantojn por okupi la komitatajn postenojn, kiuj laŭ la regularo vakis en tiu dato. La komitato por 1936 estas do la jena:

Prezidanto: Sro. Ramón de Salas Bonal.  
Vicprezidanto: Sro. Feliciano Turrión Quintero.  
Sekretario: Sro. José Martínez Martínez.  
Vicsekretario: Sro. Jesús Puértolas Latre.  
Kasisto: Sro. José Larruga Bernal.  
Vickasisto: Sro. José Vergara Bueno.  
Kalkulisto: Sro. Lorenzo Til Grasa.  
Vickalkulisto: Sro. José Gascón Carreter.  
Komitatano 1-a: Sro. José Orós Gimeno.  
Komitatano 2-a: Sro. A. Pedro Marqueta Roy.  
Komitatano 3-a: Sro. Emilio Artigas Trigo.  
Komitatano 4-a: Sro. Hernando Ostalé Torrecillas.